

# O BRASIL — ESPERANTISTA

ORGÃO OFICIAL DA "LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA" — Sociedade de utilidade pública.  
NOVA FASE DO "BRAZILA ESPERANTISTO"

Número 34-36 (293-295)

Outubro-Dezembro 1940

Redator responsavel:  
Dr. Carlos Domingues

Administração e redação:  
Praça da República, 54.  
Rio-de-Janeiro. Brasil.

Gratuito para os sócios da Liga.  
Eksterlande: Unu dolaro aŭ 15  
respondukuponoj.

## LA UNUA JARDEKO DE LA NOVA ŜTATO

De la tria ĝis la deka de Novembro okazis en la tuta Brazilo brilaj festoj memorigaj de la unua jardeko post la 1930a Brazila Revolucio, dum kiu funkciis kiel Respublika Prezidanto lia Moŝto D-ro Getulio Vargas. Tiuj festoj, kiuj komenciĝis per solena aerlibera meso, konsistis el milita kaj laborista paradoj, patriotaj paroladoj, ekspozicioj, inaŭguro de la internacia foiro, koncertoj de muzikistaroj, aviadaj konkursoj, infanaj kantoj, festenoj k.c. Ili finiĝis per kolosa festeno por trimil personoj organizita de dungintoj kaj dungitoj, dum kiu D-ro Getulio Vargas faris sian lastan paroladon, el kiu ni elĉerpis ĉapitron, kiun ni tradukis esperanten kaj sekve publikigas:

"LEĜARO KAJ SOCIA ANTAŬZORGO. La organizado de helpo al la laboristoj estas ekskluziva ellaboraĵo de la 1930a revolucio. Antaŭe, vi bone scias, la dungito ne havis leĝan subtenon kaj liaj depostuloj, eĉ se justaj, estis "policaĵ aferoj".

Ni jam posedas laboristan leĝaron adaptitan al niaj sociaj bozonoj, unu el la plej kompletaj, konsistantan el: protekto al la nacia laboristo per la fiksado de la du trionoj kaj egaleco de la salajro kompare kun la fremdulo; normala okhora taglaboro, escepte por la malsanigaj industrioj; garantio de dimanĉa ripozo kaj de salajrata ferio; minimuma salajro; protekto kontraŭ la maljusta maldungo; speciala protekto al la virina laboro, speciale al la gravediĝintino; protekto al la laboristo malpli aĝa ol 18 jaroj; protekto kontraŭ la akcidentoj kaj la laŭprofesia malsanoj; garantio de la profesia



Lia Ekscelenco S-ro D-ro Getulio Vargas,  
prezidanto de la Brazila Respubliko

FELIĈAN  
NOVJARON

1941



instruado al la lernknaboj en la industriejoj; kreado de manĝejoj por la manlaboristoj; protekto al diversspecaj intelektaj laboristoj; rekono de la kolektivaj kontraktoj kaj la ebleco de ĝia etendo al ĉiuj samkategoriaj profesiuloj; la Justeco de la Laboro. Sed tiu helpo ne sin limigas al la laŭleĝaj antaŭrimedoj. Ĝi ankaŭ atingas la ekonomian helpon. En la jaro 1930a ekzistis 43 kaso de emeriteco kaj pensio kun 140.000 anoj, kies jara salajro, bazo de la kontribuo, sumiĝis 472 milionoj da rejsoj. En la jaro 1939a tiuj organizaĵoj enhavis ses institutojn kun 1.550.000 anoj kun la salajro de 4.500 milionoj da rejsoj kaj 90 kasojn kun 290.000 anoj kun la salajro de 1.100 milionoj da rejsoj, kiuj pagis ĉirkaŭ 788 milionojn da rejsoj, kiel bonfarojn, kaŭze de emeritecoj, pensioj al heredintoj kaj medicin-hospitalaj helpoj. Estas notinde, ke ĝis la jaro 1930a la tuto de tiuj bonfaroj sumiĝis nur 105 milionoj da rejsoj.

Krom tio, per la savrimedoj rezervitaj ĉe la domkonstruata sekcio, oni komencis la programon de konstruadoj de hejmoj por la laboristoj. En la Federacia Ĉefurbo kaj en la Ŝtatoj jam estas multnombraj komfortaj kaj propraj vilaoj. La laborulo en Brazilo povas sin konsideri elemento tute partoprenanta la socian vivon. Li plibonigis sian politikan indecon kaj sukcesis vidi firmstara sian klopodon, kun la garantio de la estanteco kaj la certeco pri la estonteco de sia idaro."

Al lia Moŝto D-ro Getulio Vargas la prezidanto de "Brazila Ligo Esperantista" sendis, en ties nomo, gratulan telegramon.

## GEOGRAFIO KAJ ESPERANTO

Okazis en Septembro en la urbo Florianópolis, ĉefurbo de ŝtato Santa Catarina, sub la prezido de S-ro Ministro Bernardino de Souza, la 9.<sup>a</sup> *Brazila Kongreso de Geografio*, kiu havis brilegan sukceson. Al ĝi aliĝis 2.137 personoj kaj oni prezentis 215 tezojn. La kongreso aprobis unuanime la jenajn deziresprimojn pri Esperanto:

“Konsiderante, ke la Brazilaj Kongresoj de Geografio, kunvenintaj en la urboj Rio-de-Janeiro, Recife, Salvador, Belo Horizonte, Paraíba kaj Vitória aprobis aplaudajn deziresprimojn por la propagando de Esperanto kaj konsilis la tradukon en tiun ĉi helplingvon de verkoj de brazilaj aŭtoroj;

konsiderante, ke la *Revuo de la Geografia Societo de Rio-de-Janeiro* publikigadis de la jaro 1933-a resumojn en Esperanto de siaj artikoloj;

konsiderante, ke la “Brazilia Instituto de Geografio kaj Statistiko” akceptis Esperanton kiel sian helplingvon kaj dufoje publikigis en tiu lingvo Resumeton de la “Statistika Jarlibro de Brazilo”, ke ĝi enmetis tiun lingvon en la programon de la Perfektiĝa Kurso organizita por la oficistoj de la Departementoj de Statistiko en la ŝtatoj, kaj ankaŭ ke la *Brazila Revuo de Geografio*, oficiala organo de la Instituto, ekde sia unua numero, publikigis resumojn ankaŭ en Esperanto de siaj ĉefaj artikoloj, laŭ la decido de la Unua Kongreso de la Geografiaj Konsilantaroj;

La 9.<sup>a</sup> *Brazila Kongreso de Geografio* decidis refojigi la apogon de la antaŭaj Kongresoj al la Esperanto-movado, dezirante, ke aliaj sciencaj asocioj ankaŭ publikigu esperantajn resumojn de la artikoloj de siaj bultenoj”.

“Konsiderante, ke la “Brazilia Instituto de Geografio kaj Statistiko”, kiu donadis ekde sia fondo fortan apogon al la propagando de Esperanto, kiun ĝi akceptis kiel sian helplingvon, intencas publikigi en tiu lingvo resumon de la Geografio kaj Historio de Brazilo;

La 9.<sup>a</sup> *Brazila Kongreso de Geografio* decidis doni sian sinceran aplaudon al tiu iniciativo, kiu havos grandan eĥon en la tuta mondo civilizita kaj certe kontribuos por pli granda disvastigo de la brazilaj aferoj”.

Subskribis la unuan deziresprimon la jenaj personoj: D-ro Cristovão Lei-

te de Castro, ĝen. sek. de la *Konsilantaro de Geografio*; d-ro Mario Teixeira de Freitas, ĝen. sek. de la *Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko*; d-ro Alexandre Emilio Sommer, sek. de la *Organiza Komitato de la Kongreso*; d-ro Carlos Domingues, ĝen. sek. de la *Societo de Geografio de Rio-de-Janeiro*, kaj ing. A. Couto Fernandes, prez. de *Brazila Ligo Esperantista*. La duan deziresprimon subskribis la tri lastaj personoj.

## LA BRAZILAJ GEOGRAFIAJ REVUOJ kaj ESPERANTO

“Revista Brasileira de Geografia” (*Brazila Revuo de Geografio*), oficiala organo de la “Brazilia Instituto de Geografio kaj Statistiko”, registara departemento. — Julio 1940a. Ĝi enhavas kvar ĉefartikolojn kun resumoj en kvin naciaj lingvoj kaj en Esperanto. Jen la titoloj de tiuj artikoloj: “Caxambú” — fama stacio de mineralaj akvoj —, “Civilizado de la Sukero en Brazilo”, “Aktuala brazila teritoria Divido” kaj “Geografio de la Transportoj en Brazilo”.

Ĉiu numero kostas 5\$000 aŭ kvin poŝtajn respondkuponojn.

“Revista da Sociedade de Geografia do Rio-de-Janeiro”. Volumo XLVI — 1939. Resumo en Esperanto de ĉiuj artikoloj, kies titoloj estas: “Pro la Unuigita Brazilo”, “Demando pri la landlimoj inter Gvatemalo kaj Angla Honduraso”, “Honorigo al la nomo de Luperco Hopke”, “La literoj F, L kaj R ĉe la amerikolaj nomoj”, “Aleksandro de Gusmão — Lia vivo kaj lia verko”, “Anomalia observata ĉe la maroj de haveno Paranaguá”, “Ekposeda parolado de d-ro João Paulo de Medeiros”, “Rerigardo” kaj “La nova brazila komunuma tabelo”.

Sendu du poŝtajn respondkuponojn al: “Sociedade de Geografia do Rio-de-Janeiro” — Praça da República, 54. Rio-de-Janeiro, Brasil — kaj vi ricevos numeron de tiu revuo.

Bonvolu tuj  
pagi vian  
1941an kotizon  
al  
Brazilia Ligo  
Esperantista

## O ESPERANTO NOS CONGRESSOS DE GEOGRAFIA

Realizou-se em Setembro último na cidade de Florianópolis, capital do Estado de Santa Catarina, sob a presidência do Sr. Ministro Dr. Bernardino de Souza, o 9.<sup>o</sup> Congresso Brasileiro de Geografia. A esse congresso, que teve um brilho excepcional, aderiram 2.137 pessoas, tendo sido apresentadas 215 teses.

Foram aprovadas por unanimidade as seguintes moções referentes ao Esperanto:

“Considerando que os Congressos Brasileiros de Geografia reunidos nas cidades do Rio-de-Janeiro, Recife, Salvador, Belo Horizonte, Paraíba e Vitória aprovaram moções de aplauso à propaganda do Esperanto e aconselharam a tradução para essa língua auxiliar das obras de autores brasileiros; considerando que o Boletim da Sociedade de Geografia do Rio-de-Janeiro vem publicando desde 1933 resumos em Esperanto de todos os seus artigos;

considerando que o Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística adotou o Esperanto como sua língua auxiliar e por duas vezes publicou nesse idioma uma síntese do “Anuário Estatístico do Brasil”, que fez incluir esse idioma no programa do Curso de Aperfeiçoamento instituído para os funcionários das repartições de estatística dos Estados; e bem assim que a Revista Brasileira de Geografia, órgão oficial do Instituto, desde o seu primeiro número, tem publicado resumos também em Esperanto dos seus principais artigos, conforme decisão do 1.<sup>o</sup> Congresso dos Conselhos de Geografia;

O 9.<sup>o</sup> Congresso Brasileiro de Geografia resolve reiterar o apoio dos Congressos anteriores ao movimento esperantista, fazendo votos para que outras associações científicas utilizem o Esperanto para a tradução dos resumos dos artigos publicados em seus boletins”.

“Considerando que o Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística, que tem dado desde sua fundação decidido apoio à propaganda do Esperanto, que foi por ele adotado como sua língua auxiliar, tenciona publicar nesse idioma um resumo da Geografia e História do Brasil;

O 9.<sup>o</sup> Congresso Brasileiro de Geografia resolve dar seu franco aplauso a essa iniciativa que terá grande repercussão em todo o mundo civilizado e concorrerá certamente para maior divulgação das coisas do Brasil”.

## ESPERANTO KAJ KATOLIKISMO

La Dua Brazilia Kongreso de la Katolikaj *Jurnalisto*j, okazinta en Rio-de-Janeiro, dum la monato Oktobro nunjara, ĉe la Palaco de la Brazilia Gazetara Asocio, decidis unuanime aprobi la jenan deziresprimon, kies proponon subskribis 20 kongresanoj:

“Konsiderante, ke, okaze de la Unua Universala Kongreso de Esperanto, efektiviĝinta en la jaro 1905a, en Bulonjo-sur-Mar, Lia Sankta Moŝto Papo Pio X benis la katolikajn kongresanojn, kaj ke D-ro L. L. Zamenhof ricevis de Lia Hispana Reĝa Moŝto la komandan insignon de la ordeno de Izabelo, la katolikino;

konsiderante, ke tiu sama Papo, okaze de Lia beno al la direktoroj de la revuo “*Espero Katolika*”, en 1910, deklaris, ke “*Esperanto havis antaŭ si brilan estontecon*”;

konsiderante, ke Liaj Sanktaj Moŝtoj Papoj Pio X, Benedikto XV kaj Pio XI benis la katolikajn esperantistojn, kiuj ĉeestis la universalajn kongresojn de Esperanto kaj la internaciajn kongresojn de la katolikaj esperantistoj, okazintajn en diversaj landoj;

konsiderante, ke Liaj Kardinalaj Moŝtoj D. Joaquim Arco Verde kaj D. Sebastião Leme representigis ĉe brazilaj kongresoj de Esperanto, el kiuj la 5a estis prezidita de katolika pastro, Kanoniko Matias Freire, reprezentanto de la registaro de Ŝtato Paraíba;

konsiderante, ke, okaze de la brazilaj kongresoj de Esperanto estis diritaj mesoj speciale por la katolikaj esperantistoj, dum kiuj parolis ĉe la Evangelio por tiu helplingvo la eminentaj oratoroj D. Benedito de Souza, tiam Episkopo en Ŝtato Espírito Santo, kaj Monsinjoroj Benedito Marinho, Gonçalves de Rezende, Francisco MacDowell kaj Felício Magaldi;

konsiderante, ke paroladoj pri Esperanto kaj kursoj de tiu helplingvo okazis en la sidejoj de la *Katolika Societo* kaj de la *Brazilia Katolika Unuiĝo* kaj estis disradiitaj pere de *Rádio Vera Cruz*;

konsiderante, fine, ke oni konsideris Esperanton kiel unu el la oficialaj lingvoj de la 34a Universala Eŭkaristia Kongreso, okazinta en Budapeŝto, dum la monato Majo de l' jaro 1938a;

La Dua Brazilia Kongreso de la Katolikaj *Jurnalisto*j decidis:

Elmontri sian simpatian al la internacia helplingvo Esperanto, deziran-

## O Esperanto e o Catolicismo

O 2.º CONGRESSO BRASILEIRO DOS JORNALISTAS CATÓLICOS, reunido no Rio-de-Janeiro, de 9 a 13 de Outubro de 1940, aprovou, por unanimidade, a seguinte moção:

“Considerando que, por ocasião do 1.º Congresso Universal de Esperanto, realizado em 1905, em Boulogne-sur-Mer, Sua Santidade o Papa Pio X abençoou os congressistas católicos, e que o Dr. L. L. Zamenhof foi condecorado pelo Rei da Espanha com a comenda da Ordem de Isabel, a Católica;

considerando que esse mesmo Papa, enviando sua bênção aos diretores da revista “*Espero Katolika*” (*Esperança Católica*), em 1910, declarou: “que o Esperanto tinha diante de si um brilhante porvir”;

considerando que Suas Santidades os Papas Pio X, Benedito XV e Pio XI abençoaram os esperantistas católicos que compareceram aos congressos universais de Esperanto e aos congressos internacionais dos esperantistas católicos, realizados em diversos países;

considerando que Suas Eminências os Cardeais D. Joaquim Arco Verde e D. Sebastião Leme se fizeram representar em congressos brasileiros de Esperanto e que a União Católica Brasileira aderiu a diversos congressos universais e brasileiros de Esperanto, dos quais o 5.º foi presidido por um sacerdote, o Cônego Mathias Freire, representante oficial do Estado da Paraíba;

considerando que por ocasião dos congressos brasileiros de Esperanto foram celebradas missas para os esperantistas católicos, durante os quais falaram ao Evangelho os eminentes oradores D. Benedito de Souza, então Bispo do Espírito Santo, e os Monsenhores Benedito Marinho, Gonçalves de Rezende, Francisco MacDowell e Felício Magaldi;

considerando que conferências sobre o Esperanto e cursos deste idioma auxiliar foram realizados nas sedes do Círculo Católico e da União Católica

te, ke ĝi estu akceptata kiel unu el la oficialaj lingvoj de la internaciaj kongresoj kaj instruata en la lernejoj, laŭ decido de la Nacia Konsilantaro de Edukado, preskaŭ unanime aprobita la 11an de Novembro 1938a.

Brasileira e irradiados por intermédio da “*Radio Vera Cruz*”;

considerando finalmente, que o Esperanto foi considerado uma das línguas oficiais do 34.º Congresso Eucarístico Universal, realizado em Budapeŝto, em Maio de 1938;

O 2.º Congresso Brasileiro dos Jornalistas Católicos resolve:

Manifestar sua simpatia pelo idioma auxiliar internacional Esperanto, fazendo votos para que seja ele aceito como uma das línguas oficiais dos congressos internacionais e ensinado nas escolas, nos termos do parecer do Conselho Nacional de Educação, aprovado em 11 de Novembro de 1938, por quasi unanimidade.”

Rio-de-Janeiro, 11 de Outubro de 1940.

(Assinados) — *Jonathas Serrano, Pe. João Motta e Albuquerque, Isaac Tapajós, Pe. Leopoldo Brentano, S. J., Alberto C. de Azevedo, Christovão Brenner, Francisco Soares, Geraldo Mendes Barros, Mario Sombra, Alberto Couto Fernandes, Pe. Alvaro Negromonte, Thales de Azevedo, Pe. Francisco Carneiro, João Gonçalves de Souza, Arthur Gaspar Vianna, Ulysses de Góes, Antonio Toscano, Guilhobel Barbosa, Crimilde Leite Aguiar e R. Sá Earp.*

### TEO JUNG ESTAS VIVA KAJ SANA

Nia prezidanto Scherer ĵus ricevis leteron de nia amiko Teo Jung el Scheveningen, Nederlando. Li raportas ke li, liaj edzino kaj fileto estas sanaj... sed mankas al ili enspezoj. S-ro Jung esperas jam dum 1940 aperigi kelkajn pliajn numerojn de “*HEROLDO DE ESPERANTO*”. La Esperantistoj en Nederlando klopodas daŭrigi la vivon de la Esperanto-movado, ĉar la germana kontrolo ne estas tro severa, kaj permesas iom da libereco al la nederlanda popolo. Tamen nia amiko devas suferi pro neebleco aperigi la semajnan gazeton, kaj pro manko de mono. Ni ĉiuj esperas ke li kaj la multaj aliaj gesamideanoj en Nederlando travivos la militon, kaj ke baldaŭ ili povos denove labori por nia grandiona paciga mondlingvo. Lia letero datigis je la 5a Junio kaj alvenis en Los Angeles je la 15a Aŭgusto.

(El “*Amerika Esperantisto*”).

# A E R V E T U R A D O

## SANTOS DUMONT KAJ ERNEST ARCHDEACON



*Santos Dumont, la Patro de l'Aviado.*

Ernest Archdeacon estas nomo intime ligita al la unuaj triumfoj de la aerveturado. Tiu klera franco — unu el la plej distingindaj esperantistoj en la malnova mondo — efektive kunlaboris por la aerkonkero, kiam, en la komenco de la nuna jarcento, la pioniroj de la aerveturarto alflugadis al la nuboj en facilrompeblaj aparatoj. Kreante la premion, kiu havas lian nomon, li stimulis la klopodojn de tiuj, kiuj sin dediĉadis al la problemoj de la aerveturado, permesante ke el tiu turniro eliĝu, ankoraŭ pli glora, la nomo de Santos Dumont. Ĉar ĵus okazis en Brazilo dum la "Flugilsemajno" brilaj festoj, kiujn superdirektis Kolonelo Ivo Borges, prez. de "Brazilia Aerklubo," estas oportune enfokusigi tiun brilan eminentulon ĉe la kolonoj de "O Brasil Esperantista".

S-ro Alexandre Brigole, konata profesoro de franca lingvo ĉe la Kolegio Pedro II, fondinto kaj eksdirektoro de la fama "Franca Liceo", ĵus festinta sian fondan jubileon, kiu delonge reliefigadas per senĉesaj studoj la figuron de Santos Dumont, estas granda amiko de Ernest Archdeacon, kun kiu li havas konstantan korespondadon. Por nia gazeto bonvolis tiu klera edu-

kisto verki la jenan artikolon, kiun mi tradukis esperanten:

"En la jaro 1937a efektiviĝis, kun eksterordinara sukceso, ĉe la franca ĉefurbo, la Internacia Ekspozicio, kies brilegeco kaj mirindeco prezentis al la mondpopoloj la plej belegan bildon pri la franca civilizacio kaj la rapidega progreso de la Homaro.

"Ĉe unu el la plej bonaj lokoj de la Brazila Pavilono en tiu granda elmontrejo troviĝis la Stando kaj la montraj vitroŝrankoj de Santos Dumont, kie estis ekspoziciataj la respektindaj restaĵoj de preskaŭ ĉio, kio apartenis al la "granda aerpioniro". Tiuj objektoj, skizoj, fotografiaĵoj, estis pruntitaj de la "Aermuzeo", el Parizo, kie estas zorgege gardata ĉio, kio rilatas al la Aernavigado. Kelkaj amikoj de Santos Dumont ankaŭ pruntis multajn objektojn koncernajn al la aerveturado, kiuj havas rilaton kun Santos Dumont.

"Tiu parto de la pavilono estis ĉiam tre mirigata de la vizitantoj, kies nombro superis du milionojn kaj kvincentmil.


"La kvinan de Novembro efektiviĝis en verè brazila atmosfero grandioza franca-brazila festo honore de Santos Dumont.

"La vespero estis belega kaj tiu ma-



*S-ro Ernest Archdeacon, lingvokonsultano, prezidanto de la "Societo Franca por la Propagando de Esperanto" kaj tiam prezidanto de la "Franca Aerklubo".*

nifestado estis vera apoteozo. Ĉeestis kelkaj registaranoj, el kiuj la Ministro por la Aero, aviadistoj kaj ĉirkaŭ mil personoj el la plej gravaj en la mondo de la literaturo kaj artoj. La Tuta Aviadama Parizo, la personoj, al kiu la Aviado allogas, ĉiuj tie ĉeestis.



*La "Jako Esperanto", sur rivero Sena, en kiu loĝas s-ro Ernest Archdeacon.*



La tri portiloj ("nacelles") de la aparato de Santos Dumont, ĉe la "Aermuzeo", en Parizo.

"En tiu grandioza festo partoprenis unu el la plej grandaj esperantistoj, S-ro Ernest Archdeacon, intima amiko de Santos Dumont, kiun li kuraĝigis, admiris kaj al kiu dediĉis profundan amikecon dum lia tuta vivo. S-ro Archdeacon, kiu vivas, iom izolita de la mondo, veturante sur la rivero Sena en flosanta domo, kiun li nomis Esperanto, faris paroladeton, kiun mi malsupre reproduktas, kiel historian dokumenton kaj atestiman honorigon al nia klera samlandano pro la venko de lia eksterordinara invento.

"Jen la vortoj de S-ro Ernest Archdeacon:

"Estis en la 19a de Oktobro 1901a, kiam Santos Dumont, forflugante de St. Cloud, je la 14a kaj 42 minutoj, ĉirkaŭflugis la Turon Eiffel kaj superflugis super la Parko de l' Aero-Club, tiel glorie gajninte la sumon de centmil frankoj donacitan de S-ro H. Deutch de la Meurthe.

"Tij provoj kostis al Santos Dumont grandegan sumon, sed malgraŭ tio li ne retenis eĉ unu centimon de tiu premio, el kiu li donis parton al siaj laboristoj kaj kunlaborintoj kaj la alian parton, la plej grandan, al la Pariza Policestro, por ke ĝi estu disdonata al la ĉefurbaj malriĉuloj. Tiu malavara donaco estis uzata je formo tute originala kaj kortuŝanta: oni decidis, ke ĝi estu destinata forlasigi el la Garantipruntejo ĉiujn objektojn pli fuse deponitajn, ĝis la elĉerpiĝo de la donacita sumo.

(1). Tiu flugado estis kontrolita de la "Franca Aerklubo", kies prezidanto estis tiam S-ro Ernest Archdeacon mem. Kaj sur la kampo "Bagatelle", sur kiu okazis tiu flugado, la "Franca Aerklubo" starigis dumetran granitan limŝtonon kun la portreto de Santos Dumont kaj la jena surskribajo:

"Tamen Santos Dumont, kun sia cerbo ĉiam bolanta, petegate ankaŭ de siaj amikoj, al kies nombro mi apartenis, volis studi ankaŭ la plej pezan ol la aero, tiom pli, ke estis ankoraŭ premio konsistanta el 50.000 frankoj gajnata de la unua direkttilisto kiu en fluganta maŝino traveturo fermitan linion longa je unu kilometro.

"Je la 28a de Oktobro 1906a li traflugis rektlinie ĉirkaŭ sesdek metrojn, je alteco de tri metroj, kaj pli poste, je la 12a de Novembro, 220 metrojn en 21 sekundoj, je alteco de 6 metroj. (1)


"Mi ne bezonas raporti al vi la entuziasmon, kiu kaptis la ĉeestantaron, kaj la frenezan akklamadon faritan al la triumfinto, tiufoje antaŭ niaj okuloj; tiel la problemo estis bone kaj definitive solvita.

"Ŝajnas al mi interese noti tie ĉie por la historio la pitoreskan manieron, per kiu ni kalkulis la distancon traflugitan: ni akompanis la aeroplanon tre proksime kaj iom flanke de ĝi en rapida aŭtomobilo. Ĉe la forira momento ni faligis teren teleron kaj alian ĉe la alveno de la aeroplano.

"Mi ĉiam kunportas en mia poŝo bonegan Bregetan kronometron, kiun S-ro Santos Dumont bonvolis donaci al mi, kiel dankdevan signon pro tio, ke mi kun mia tuta energio apogis la gloron de lia unua meĥanika flugo, efektiviĝinta en Francujo, kontraŭ iaj samlandanoj miaj, kiuj intencis rifuzi al li tiun gloron".

"Per tiuj ĉi vortoj Ernest Archdeacon unufojan plian honoris la memoron de la granda brazila. Konsiderante la signifon de tiu paroladeto, mi zorgis pri ĝia reprodukto sur disko, kiun mi konservas, kiel memoraĵo de tiu belega festo de franca-brazila frateco. Ernest Archdeacon, granda esperantisto, estas sendube ora ligilo inter la du latinaj popoloj, kiuj ambaŭ egaligas ĉe la sama respekto al la senmorta brazilano."

A. Couto Fernandes



Elmontrejo de Santos Dumont en la Brazila Pavilono, ĉe la "Internacia Ekspozicio de Artoj kaj Tekniko", okazinta en Parizo en la jaro 1937a.

Ici  
le 12 novembre 1906 sous le contrôle de  
l'Aéro-Club de France  
a établi les premiers records  
d'aviation du monde  
DURÉE 21s1/5 DISTANCE, 220 m.

# Entuziasmo

.....  
En la nuna tempo ne estas eble ĉeesti internaciajn kongresojn. Ne estas eble korespondi kun amikoj en multaj landoj. Ne regas paco, harmonio kaj internacia amikeco. La matura Esperantisto perdas la plej grandan parton da sia mondo, kaj, se li ne rekapto la unuan entuziasmon, li finfine kredos ke ne estas eble fari ian ajn laboron ĝis la fino de la milito.

Kiam je la komenco de nia Esperantistigo ni havis entuziasmon, ni krome havis fidon. Ni ne povis esti certaj ke la Lingvo tiam studata vere solvos la lingvan problemon. Nun ni scias pli bone, kaj mi sugestas ke ĝuste pro nia sperto, nia entuziasmo devus esti multfoje pli granda kaj efika.

Rememorante nian sintenon en tiuj fruaj tagoj, ni nun rigardu antaŭen. Iam denove okazos Esperanto-kongreso. Iam — espereble baldaŭ — la popoloj de ĉiuj nacioj interamikigos.

Imagu la unuan postmilitan kongreson. Imagu la unuajn tagojn de la kongreso, kiam oni renkontas amikojn nevidatajn dum multaj jaroj. Imagu la sindediĉon kaj fervoron de la ĉeestantaro, kiu rekomencos sian laboron sciante ke finfine ni atingos la celon, kaj ke nia alta idealo estos aktualaĵo pro la tuta mondo.

Tio kongreso estos por la nuna generacio eĉ pli raviga kaj mirakla ol la unua, kiun oni ĉeestis, kaj ĉiu Esperantisto volos partopreni. Imagu, tamen, ke ĝi estos kelkfoje pli granda! Se ĝi valoras vian ĉeeston, ĉu ĝi ne ankaŭ valoras la ĉeeston de aliaj? Imagu tiun kongreson se intertempe ĉiu Esperantisto posedas sufiĉan entuziasmon por instigi (ni diru) minimume du aliajn personojn lerni nian Lingvon. Tio povos okazi, sed la ĉifosilo estas tiu vorto, kiun mi jam skribis dek-ses fojojn — **ENTUZIASMO!**

Se en la nuna tempo nenia progreso ŝajnas ebla, se tagoj estas malhelaj kaj oni emas perdi kuragon, ni trankvile revu dum kelkatempo. Ni rememoru la miraklajn spertojn de la estinteco. Ni revu pri la multfoje pli grandaj sukcesoj de la estonteco. Poste ni tuj eklaboru por efektiviĝi tiun revon kaj por kuraci dolorigitan kaj vunditan mondon.

ARTHUR C. OLIVER.

(El "Esperanto Internacia").

# GIMNASTIKO KAJ ESPERANTO



Grupo fotografita dum la radigimnastika festo. Sidantaj sur la unua vico: S-roj Antonio Vaz, A. Couto Fernandes, prof. Oswaldo Diniz Magalhães, d-ro Gilberto de Andrade, prez. da "Rádio Nacional", d-ro Tito Melo Carvalho, Ismael Gomes Braga kaj Nelson Gama do Nascimento.

La 15an de Oktobro, nomatan "Gimnastika Tago", matene, okazis ĉe la stacio de la "Rádio Nacional" (PRES), brila festo dediĉata al s-ro Oswaldo Diniz Magalhães, direktoro de la kurso pri radigimnastiko, kiu tie funkcias ĉiutage, de la 6.15a ĝis la 8.15a. La festo estis organizita de liaj multaj gelnantoj, kiuj samtempaj estas liaj amikoj. La vasta salono de la stacio kaj ĝia aŭdantejo estis bele flororna-

mitaj kaj homplenegaj. Ĉeestis ankaŭ la feston d-ro Gilberto Andrade, direktoro de la "Rádio Nacional" kaj ing. A. Couto Fernandes, prez. de BLE kaj instruinto de la kurso de Esperanto por radigimnastikuloj, speciale malfermita de la "Brazila Klubo Esperanto", kaj pluraj geesperantistoj.

Salutis s-ron Magalhães f-inoj Maria Luiza Barcelos kaj Hercilia Silva, la knabeto Nilson Cunha Silva kaj s-ro Ismael Gomes Braga, kiu profitis la okazon por reliefigi la grandan simpatian de Oswaldo Magalhães al Esperanto. S-ro Antonio José Vaz salutis siaj gekolegojn, d-ro Tito de Mello Carvalho la Societon "Rádio Nacional" kaj s-ro Nelson Gama do Nascimento esprimis la dezirojn de siaj gekolegaj pri la ĉiama progreso de la Gimnastika Horo kaj de "Rádio Nacional". Ĉe la muzika programo partoprenis f-inoj Evelina De Pinto Falcão Lopes, Carmen Bertucci, Lucy de Souza e Silva, Olga P. de Souza e Silva kaj s-ro Jorge Paiva. Al s-ro prof. Magalhães oni faris multajn donacojn.

## RADIO KAJ ESPERANTO SÃO PAULO

La ĉiutaga disradiado de la esperantista horkvarono pere de la stacio de "Rádio Piratininga" (PRH-3) okazas nun de la 8.45a ĝis la 9a. Laŭ informo ricevita de nia fervora samideano s-ro Oswaldo Leite de Moraes, el la ŝanĝo de la disradiata horo rezultis pligrandigo de la nombro da ĉefurbaj aŭdantoj kaj tio profite kompensis la perdojn de kelkaj eksterurbaj. S-ro Ismael Braga donacis al tiu radisocieto 2.000 ekzemplerojn de la nova eldono de la lernolibreto "Primeiras Lições de Esperanto". Tial ĝi estas disdonata senpage al ĉiu ĝin petinta.

Tiu radisocieto ŝanĝis la 22an de Septembro sian sidejon. Ĝi nun okupas la tutan dek-unuan etaĝon kaj parton de la dekdua etaĝo de ĵuskonstruita ĉielskrapanto, ĉe la urbocentro. Je la tago de la inaŭguro de ĝiaj novaj instalaĵoj, kiun ĉeestis la Ŝtatestro kaj altaj civilaj kaj militaj aŭtoritatuloj, paroladis en Esperanto estraranoj de "São Paulo Esperanta Klubo". Ekde tiu tago la esperantista horkvarono havas specialan muzikan prefikson, konsis-

tantan el pecoj de belaj internaciaj muzikoj. Multaj gelnantoj aŭdas la lecionojn en la vasta stacia aŭdantejo, kie, post la disradiado, ili povas fari konsultojn al la instruintoj.

De la ekdisradiado (25a de Marto) ĝis la 7a de Oktobro la Klubo disradiis 155 horkvaronojn, kiuj konsistis el 88 lecionoj, 67 paroladetoj kaj kelkaj deklamadoj.

Al la estraro de la "Rádio Piratininga" niajn varmajn dankojn pro la tre valora helpo donata al la propagando de la helpingvo Esperanto!

## CINEMA E ESPERANTO

Se eu alguma vez houvesse duvidado do êxito do Esperanto como língua universal, do mesmo êxito eu me convenceria por via de modo pelo qual o cinema o está utilizando.

Neste decênio, já varios filmes têm feito ler e ouvir falas e canções na lingua segunda, a começar por um diálogo da Paramount Novidades, em 1930.

A Metro, em 1938, editou a película de grande tiragem *Idiot's Deligth*, aqui exibida com o titulo *Este mundo louco*, com muitas frases e cartazes em Esperanto.

No ano passado, ele figurou nos preconcios e em palavras da fita *Conspiracy* e o mesmo idioma se escutou num trecho do filme *Mulher do tropico*.

E agora mesmo está sendo aqui exibida a película *A sereia das ilhas*, na qual uma canção em esperanto é cantada, por duzentos artistas, em empolgante massa coral, afirmando à imprensa os seus intérpretes, bem como os protagonistas, Dorothy Lamour e Bing Crosby, que "a lingua internacional é maravilhosa para o canto".

Ora, toda a gente sabe que a arte cinematográfica, com o desenvolvimento e o progresso que atingiu, exige um complexo de "especialidades" comprovadas, cuja atuação conjunta dê aos filmes qualidades que lhe garantam a boa aceitação pelo público e, pois, um lucro remunerador das somas dispendidas com a fatura dos mesmos.

Todos os pormenores, por mais insignificantes que sejam, da filmagem exigem outros tantos "técnicos" experimentados.

Pois bem: Carl Laemmle, presidente da Universal Studio, e Fred Niblo, o famoso diretor de cena da Metro-Goldwyn-Meyer, não hesitaram em recomendar o Esperanto no cinema.

E a direção da Paramount, em programa distribuido aos assistentes duma exibição especial para a imprensa, proclamou-o "a mais sonora das línguas", utilizando-a, já neste ano, em o filme *Victory*.

Ninguém há, em todo o mundo civilizado, que ignore o valor e o prestígio, sempre mais largos e mais eficientes, do cinema, do rádio e da imprensa, que, em toda parte, já se puseram a serviço do Esperanto, por cõscios da sua utilidade.

Juntem-se a isso os congressos e as conferências, nacionais e internacionais, nos quais se ouve o Esperanto, bem como os livros em conta imensa, que hoje circulam, nele escritos, ou para ele vertidos.

Convencida das vantagens que ele contém e do bem que, por seu intermédio, pode ser feito, a Igreja, sempre sábia, já manifestou as suas simpatias por ele.

Tais vantagens ainda mais se patenteiam neste momento.

Quando nações, por não se entenderem, estão em guerra, o Esperanto, como instrumento de entendimento entre todos os povos, ainda melhor se afirma como fator de paz. — D. B. — (Domingos Barbosa).

De "O Jornal do Brasil".

## ESPERANTO EN USONO



S-ro Ernest Dodge, Estro de la Aga Komitato de "Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko (E. A. N. A.).

S-ro Ernest Dodge (prononcu "daĝ") estas usonano, kies prapatroj elmigris tre frue el Anglujo, unu en 1629, unu en 1638, kaj ceteraj iom pli poste. Lia patro estis profesoro en malgranda kolegio. S-ano Dodge naskiĝis je 1870 en ŝtato Michigan, ("miŝigen.") En fruaj vivjaroj li estis instruisto de la greka kaj latina lingvoj, sed nun de multaj jaroj havas postenon en unu el la fakoj de la federacia registaro en Washington.

Jam ĉirkaŭ 1911 li ekstudis kaj admiris Esperanton; sed pro manko de tempo kaj pro la dubkaŭzanta ido-skismo, li havis tiam malcertecon pri la fina venko, kaj refalis en neaktivecon. Sed de post 1933 li eklaboris kaj laboradas en la Esperanto-movado, kaj pentas pro la antaŭe de li perditaj jaroj. De 1934 li estas Estro de la Aga Komitato de EANA.

En la angla lingvo li estas aŭtoro de pluraj gazetartikoloj diverstemaj, kaj (1901) de volumo de originalaj poemoj, kiu ĉirkaŭiris nur private je kelkcent ekzempleroj. En Esperanto, krom la pretigo de multaj propagandartikoloj, li tradukas Esperanten plurajn poemojn

## FILATELIO KAJ ESPERANTO

Memorigante la dekan datrevenon de la ekposedo de d-ro Getulio Vargas, kiel prezidanto de la Brazila Respubliko, la "Brazila Filatelio Klubo", kiu havas nun komfortan sidejon ĉe la Avenuo Graça Aranha, 26, organizis allogan ekspozicion de ĉiuj postajoj eldonitaj de la brazila Registaro dum la unua jardĝko de lia regado.

Dank'al la ĝentileco de ĝia estraro, Brazila Ligo Esperantista" aranĝis standon, en kiu elmontrigis la du poŝtmarkoj memorigaj de la 8a kaj 9a Internaciaj Specimenfoiroj de Rio-de-Janeiro kun vortoj de la portugala kaj esperanta lingvoj, la du poŝtmarkoj, kun teksto nur en Esperanto, memorigaj de la 9a Brazila Kongreso de Esperanto kaj de la Ora Jubileo de Esperanto, okazinta en Varsovio, la du serioj da ilustritaj poŝtkartoj kun teksto en la nacia kaj internacia lingvoj, la ilustrita poŝtletero kun teksto ankaŭ en Esperanto, ĉiuj stampoj kun vortoj en Esperanto uzitaj de la poŝtagentejoj dum ekspozicioj, foiroj kaj kongresoj okazintaj en Brazilo, la stampo kun la vortoj: **TURISMA URBO** nun ankoraŭ uzata de la poŝtagentejo en Avenuo Rio Branco, kelkaj interesaj poŝtkartoj kaj, fine, la bela bildo titolita "Brazila Poŝto kaj Esperanto."

Al la estraranoj de la "Brazila Filatelio Klubo", precipe al Monsinjoro Luiz Gonzaga do Carmo, prez., s-ro Hugo Fraccarolli, sek., kaj s-ro Manoel Rodrigues Caldas, kas., "Brazila Ligo Esperantista" tre kore dankas.

el la usona literaturo: kaj en la serio nomata "Muusses-Esperanto-Biblioteko," eldonita en Nederlando antaŭ la milito, No. 18 estas libreto de S-ro Dodge, "Flugado Alimonden," kiu pritraktas la problemon pri venko de intermonda spaco, ne laŭ la populara fantazia vidpunkto, sed laŭ vidpunkto scienca. La libreto ankaŭ subtenas la tezon, ke kunlaborado grandskala de l' homo je trege malfacila kaj multekosta entrepenego (kia estos interplenada esplorado) eble emos satigi la aventuraĵon de l' homo, kaj fariĝos bona, eble decidigas, faktoro por intergenta fratiĝo kaj paco.

Al tiu fervora usona samideano, kies 70a naskiĝa datreveno ĵus okazis, Brazila Ligo Esperantista sendas korajn gratulojn.

# Ŝ I

— Veglora batalanto, vi estis ĉe la morto!

Eklevinte la palpebrojn, mi tuj vidis sur milda brusto ruĝan krucon, kaj super tiu... nu!, super la kruco, kiel Dia promeso, brilis verda stelo! Tamen alia koloro tuj poste venis al mi ĝiskoren. De anĝelbela vizaĝo du bluegaj okuloj ridetis al mi...

— Senglore glora batalanto!...

Kaj tiuj okuloj iĝis kvazaŭ grizaj. Ĉu ploris ŝi? Konvinke mi ne povas respondi, ĉar mi estis tiel lacega, ke io simila al sveno tuj kaptis min.

Kiam la konscio revenis, denove tiu ĉarma vizaĝo estis ridetante ĉe mia lito.

— Vi estas... Kiu?

— Via malamikino, frato... frato mia!

Tiujn lastajn vortojn, kvankam varmege, ŝi aldiris tre mallaŭte.

Tiam mi ekmemoris pri la plej kortuŝa fakto en mia vivo, okazinta antaŭ ol mia forkapto. Nia generalo estis ordoninta atakon per bajoneto. Ekis do la hombuĉado. Subite giganta viro haltis antaŭ ni, kun siaj okuloj fiksataj sur mia brusto, dum sur lia ion kvinpintan, verdan mi ekvidis. Daŭris tio malgrandegan temperon. Neatendite, la mallamiko tordiĝis angore, falis antaŭen kaj samtempe akregan doloron mi sentis en mia ventro, kaj ĉio malheliĝis...

— Ĉu vi deziras ion, mia frato?

— ... vian muzikan voĉon... Ĝi estas io ĉi... ela!

— ... vi ŝatas amsercojn... Tamen pripensu: al la homoj ne plaĉas aŭdi voĉojn el la ĉielo...

Nepriskribebla tondrego ŝajnis fali ĉion sur min. Infera pafado eksonegis ie proksime.

— Vi estas prava. Vi treege pravas, difratino mia!

— Cetere, tiuj detruiloj faras tiom da bruoj!

— Nu, urĝas, ke aliaj ne aŭdu la singlutojn, malbenojn...

— Ho! haltu, amardolĉa malamiko...

— ... veojn, dentgrincojn...

Dume, la aeraj militmaŝinoj promenadis minace super la Hospitalo de la Ruĝa Kruco.

— Via armeo perdis grandegan membron da homoj je la lasta atako kontraŭ niaj ŝirmiloj. Ŝajnas, ke ĝi ne malfrue revenos por venĝo.

— Venĝo, milito... Kiaj estas tiaj aferoj?

— Nur Dio scias tion. Nur Li, kiu decidas pri vivo, pri morto...

— Morton multfoje decidas homoj... Pri mi, kio okazis al mi? Memkompreneble...

— Vi jam resaniĝas!

— Do, tiel same jam estas necese... ke mi mortu!

— Ho!

— Tiam la duan fojon mi rimarkis, ke ŝiaj okuloj ekgriziĝas... Aminda!

Unu matenon, ŝi singarde eniris en nian ĉambron. Ŝiaj diinaj lipoj tuŝis mian orejon, ŝia voco karesis:

— Oni subrigardas min. Zorge!

De tiam mi ne plu vidis ŝin. Al mi amaraj pripensoj venis en la cerbon. Verŝajne ŝi estis kaptita, kaj tio estis terura.

La junulino, kiu ŝin anstataŭis, estas funebre silenta, glacia. Ŝi marŝis kvazaŭ per kotonaj piedoj, tiamaniere, ke iufoje mi imagis ŝin fluganta.

Venis finfine la fatala tago.

Ĉio ĉirkaŭe estis bruegoj kaj tondroj. La mortigiloj dismetis ĉien siajn brulfajrajn semojn. Vicegoj da meĥanikbirdoj surflugis la militsanigejon. Bombardiloj eksplodadis ĉie dum ĉio disfalis bruege. Langoj el fajro detruis elektis la murojn de la konstruaĵoj. De ie venis ĝis miaj oreloj virinaj plorvoĉoj, kaj io terura eltordis mian koron. Ŝi! Kie ŝi estus?

Oni ofte aŭdis afliktajn, komandkriojn kaj la soldatoj, surprizitaj, diskuradis sen direkto.

La ĥaoso forgesigis ilin, ke estas aliaj en la forte ŝlosita ĉambro. Dume la danĝero ja estis ne malpli grava. Nia malliberejo estis sufoka, brule varmega, sed dank' al la detruaj fajro-rokisoj de la brulego, granda breĉo alvokis nin eksteren.

Ŝin mi trovis preskaŭ senviva sub restaĵoj de la funebra festeno.

Ĉe miaj brakoj ŝi povis balbuti agonio:

— Ni fieru... Nu, ni ja vivis dolĉan peceton el la revo... de Zamenh...

La trian fojon tiuj tiel bele bluaj okuloj fariĝis grizaj...

Kaj mi forte premis frenezege kontraŭ mia brusto tiun jam nevarman stelujon.

Ve! Ŝi...

## NEKROLOGO

### Irene Amelia Santos



La brazila esperantistaro ĵus suferis gravan perdon. Kun la aĝo de 77 jaroj mortis s-ino Irene Amelia Santos, al kiu la Esperanto-movado multe ŝuldas. Ŝi estis instruistino de portugala lingvo, piano kaj kanto. En la jaro 1907a ŝi enskribiĝis en la perkorespondadan kurson de s-ro A. Couto Fernandes, tiam prezidanto de Brazila Klubo "Esperanto", al kiu ŝi aliĝis en 1907. Ĝis sia morto ŝi restis anino de tiu klubo kaj de la Brazila kaj Internacia Ligoj. Dum kelkaj jaroj ŝi apartenis al la Konsilantaro de tiu klubo kaj la 30an de Junio 1910a ŝi ricevis la deplomon de "Profesorino aprobita" post ekzameno okazinta en la Normala Lernejo sub la prezido de Medeiros e Albuquerque.

Ŝi estis kunfondintino de la glora "Virina Klubo" kaj ties unua prezidantino. En kompanio de sia patrino, s-ino Amelia Campos dos Santos, kiu estis sincera amikino de Esperanto, ŝi ĉeestis multajn festojn organizitajn de "Virina Klubo", kies nomo revokas en nian memoron tiun de la karmemora f-ino Julia Fernandes, kaj la monatajn vespermanĝojn efektivigitajn de "Brazila Klubo Esperanto".

Ŝi instruis Esperanton ĉe "Pedagogium" kaj ĉe la publikaj lernejoj Benjamin Constant, Padre Antonio Vieira kaj Vitorio da Costa kaj longe korespondadis kun eksterlandaj gesamideanoj.

Al ŝia familio ni sendas, en la nomo de "Brazila Ligo Esperantista" sincerajn kondolencojn.



# BRAZILA KRONIKO

**CEARÁ. Fortaleza.** — Funkcias regule la kursoj direktataj de d-ro Democrito Rocha kaj s-ro J. Serrão Filho. Ni eksciis, ke 20 lernantoj de tiu ĉi instruanto klopodas por fondi esperantistan grupon, kies sidejo estos: Rua D. Isabel, 255. La gazetoj "O Povo" kaj "Gazeta de Notícias" publikigis la tutan deziresprimon aprobitan de la Dua Brazila Kongreso de la Katolikaj Journalistoj.

**Baturité.** — S-ro Leŭtenanto João Gurgel de Moura, loĝanta ĉe Praça da Matriz 168, skribis leteron al la prez. de B.L.E., petantan informon pri la fondo de esperantista grupo. Al li oni sendis la petitajn informojn kaj diversajn esperantaĵojn.

**Limoeiro.** — Subskribitan de d-ro Deoclecio Lima Verde ni ricevis leteron, per kiu li sciigas nin, ke la unuan de Septembro lasta fondiĝis en tiu urbo "Grupo Esperantista de Limoeiro", kies estraro konsistas el la jenaj personoj: Prez. — d-ro Deoclecio Lima Verde, kuracisto; sek. — s-ro O. Odilo Silo, farmaciisto; kas. — s-ino Judite Saraiva, notariino. Dezirante al la grupo laboreman vivon ni esperas, ke ĝi aliĝu al niaj nacia kaj internacia Ligoj.

**Pereiro.** — Ni legis sur la ĵurnalo "O Povo", el *Fortaleza*, ke dum la monato Junio fondiĝis en tiu urbo "Centro Esperanta de Pereiro", kiu elektis la jenan estraron: Prez. — s-ro Hermes Dantas Ribeiro, sek. — s-ro Joaquim Marques Fernandes, kas. — s-ro Osorio Francisco dos Santos kaj konsilantaj direktoroj — s-roj Licurgo Bandeira, Alberto Moraes, Francisco Nogueira Amorim, Sergio Queiroz kaj Francisco Dantas Ribeiro. Provizora sidejo: Praça da Matriz. Kvankam tiu ĵurnalo informis, ke la grupo aliĝos al BLE, ni ankoraŭ ne ricevis skribaĵon de ĝia estraro.

**RIO GRANDE DO NORTE. Natal.** — Dank'al klopodoj de s-roj Moacir S. Cunha kaj Arlindo Castor de Lima fondiĝis, la 28an de Septembro lasta, "Associação Potiguar de Esperanto", kies unua estraro konsistas el la jenaj personoj: Prez. — s-ro Moacir S. Cunha, ĝen. sek. — s-ro Luiz Maria Alves, unua sek. — s-ro Arlindo Castor de Lima, dua sek. — s-ro José Alcantara Barbosa, kas. — s-ro A. Calmon da Costa, bibl. — instruistino Edith Camara. Oni elektis korespondaj anoj s-rojn Ismael Gomes Braga kaj A. Couto Fernandes. Dank'al la ĝentileco de d-ro Luiz Antonio, prezidanto de la "Instruistara Asocio", ties sidejo, ĉe strato Vigario Bartolomeu, 587, es-

## POŝTO KAJ ESPERANTO



*Specimeno de la stampo uzata de la Poŝtagentejo instalita ĉe la ejo de la 13a Internacia Specimenfoiro de Rio-de-Janeiro.*

*Tion oni ŝuldas al d-ro Libero de Miranda, regiona direktoro de la Departamento de Poŝto kaj Telegrafo, kiu ĝentile plenumis la peton de la prez. de B. L. E.*

tas ankaŭ sidejo de la esperantista asocio. Ĉe la tago de ĝia fondo, kiun ĉeestis d-ro Americo Costa, reprezentanto de la ŝtatestro, la reprezentanto de la ĉefepiskopo kaj diversaj gravaj personoj, paroladis tiu sinjoro kaj s-roj d-ro Luiz Camara Cascudo kaj Moacir S. Cunha.

La loka gazetaro estas simpatia al Esperanto. "Estudante", oficiala organo de "Centro Estudantal Potiguar", kaj "O Diário" aperigis kelkajn artikolojn de s-roj Moacir Cunha kaj Arlindo de Lima. En artikolo aperinta en tiu ĉi gazeto, titolita "Brazilo kaj Esperanto", s-ro Moacir Cunha detale parolas pri la "Statistika Resumeto" kaj faras sugeston al d-ro Gentil Ferreira, ĉefurbestro, por ke li uzu Esperanton en la organizata "Gvidlibro pri Natal". S-ro d-ro Ulisses de Gois, direktoro de la katolika ĵurnalo "A Ordem", foriris al Rio-de-Janeiro, kie li partoprenis la Duan Brazilan Kongreson de la Katolikaj Journalistoj kaj subskribis la deziresprimon aprobitan de tiu ĉi kongreso. "A Republica" publikigis artikolon de s-ro Aderbal de França, kiu sin kaŝis sub la pseŭdonimo *Danilo*.

Vojaĝante tra la ŝtata interno s-ro Moacir Cunha profitis la okazon por propagandi Esperanton. Tiam li vizitis, en Mossoró, la esperantistojn s-ron Targino Soares kaj d-ron Julio Cesar Gurgel kaj, en Areia Branca, d-ron A. Gentil Fernandes, kiu direktas kurson

de Esperanto, kaj d-ron S. Maltez Fernandes, kiu, kiam deputito, prezentis al la deputitara ĉambro salutesprimon al la 9<sup>a</sup> Brazila Kongreso de Esperanto. Vizitante la ĉefurbon de la najbara ŝtato Ceará li havis la okzon interparoladi kun d-ro Democrito Rocha, kiu donacis al li kelkajn librojn de Esperanto.

**PARAÍBA. João Pessoa.** — La prez. de BLE ricevis ĝentilan leteron de Kanoniko Mathias Freire, kiu prezentis la ŝtaton Paraíba ĉe la 5a Brazila Kongreso de Esperanto, kiun li prezidis. Li diras, ke li gardas ĉiam vivajn en sia memoro la tagojn, kiujn li pasigis dum tiu kongreso, kaj restas ĉiam fidela al Esperanto. Ni rememorigas, ke oĝaze de la 9a Brazila Kongreso li subskribis unualoke la salutesprimon, kiun la Deputitara Ĉambro sendis al ĝi.

**PERNAMBUCO. Recife.** — Kun granda ĝojo ni ricevis la okan kaj la naŭan numerojn de "Pernambuco Esperantista", kiu estas nun sub la direktado de f-ino Artemisa Vidal de Araujo. Tiu ĉi anstataŭis la provizoran direktoron s-ron Antonio Jacome de Araujo. Krom riĉa literaturo kaj sciencia artikolo de d-ro Aguinaldo Lins, prez. de la Asocio, aperis sur ĝiaj kolonoj la lasta artikolo de Odilon de Araujo, esperanten tradukita de Ismael Braga, la antaŭparolo de la *Statistika Resumeto*, en portugala kaj esperanta lingvoj, kaj la unua leciono de kurso de Esperanto aperonta en libro. Al ĝia direktorino, inteligenta filino de Odilon de Araujo, al s-ro Alcides Pereira de Carvalho, kompostisto, kaj al s-ro Manuel Gomes de Santana, paĝordigisto, niajn sincerajn gratulojn.

Pro la morto de Odilon de Araujo nia malnova samideano s-ro Sebastião de Albuquerque reprenis sur sin la taskon direkti la kurson de Esperanto pere de la stacio de "Rádio Clube de Pernambuco" (PRA-8). Lia unua leciono estis dediĉita al la memoro de nia karmemora esperantisto.

**Caruarú.** — Jen estas la estraro de "Grupo Esperantista Couto Fernandes": Prez. s-ro Evandro E. Vasconcelos, sek. — s-ro José Rogoberto de Barros kaj kas. — d-ro Luiz Pessoa da Silva. La grupo ricevis la viziton de s-ro Antonio Jacome de Araujo, ano de PEA kaj fakdelegito de IEL. La gazeto "Vanguarda" publikigis artikolon de f-ino Carmosina Monteiro, unua sek. de "Grupo Esp. Ismael Gomes Braga".

**Garanhuns.** — "Grupo Esperantista Ismael Gomes Braga" daŭrigas sian viglan propagandon. "O Moni-

tor" publikigis fotografiaĵon, en kiu oni vidas nian karegan samideanon Pastron Agostino Stellacci, kiu estas nun en Santos, s-ron Odilon V. de Arakjo kaj ties filinojn Artemisa kaj Besilda, artikolon de s-ro Polinício Buarque de Amorim pri la datreveno de la eltrovo de Ameriko, kiu estas samtempe tiu de la fondo de tiu grupo, kaj artikolon titolitan "Esperanto jam venkis la mondon".

**BAÍA. Salvador.** — "Esperanta Grupo de Baía" faris bonan propagandon pri la helplingvo dum la prezentado de la filmo "Este mundo louco" ("Idiot's Delight").

D-ro Jaddo Couto Maciel, kiu estas radiamatoro kaj ano de la "Brazila Ligo de Sendradi-amatoroj" kaj uzas la prefikson PY6AL, faris la 31an de Oktobro paroladon pri "Esperanto ĉe la Radiamatorismo", dum la programo de la "Naciisma Propagando", organizita de tiu Ligo.

Nia samideano s-ro Vitor Miniero, kiu loĝis en *S. Paulo*, transloĝiĝis al *Salvador*, kie li instruas ĉe metia lernejo kaj helpas la lokan grupon propagandi Esperanton.

"Bahia Espirita" komencis publikigi serion da artikoloj por Esperanto. Jam aperis tri artikoloj titolitaj: "Nekredebla", de s-ro Antonio Tulio, "Vojo al la Paco", de Cristiano Agarido, pseŭdonimo de konata esperantisto, kaj "Naturaj kaj artefaritaj lingvoj", de Ismael Braga.

**ESPÍRITO SANTO. Cachoeira do Itapemirim.** — Malfermiĝis kurso de Esperanto ĉe la "Centro Spiritista", sub la direkto de s-ro Lourival Serrão. Enskribiĝis 10 gelernantoj.

**SÃO PAULO. São Paulo.** — Vere mirinda kaj imitinda estas la nuna Esperanto-movado en tiu ĉi ĉefurbo, dank'al la inteligenta, vigla kaj sindona propagando, kiun faradas la estraro de "São Paulo Esperanta Klubo" per kursoj, radiparoladoj, gazetnotoj, ke. La Klubo, kies nombro da anoj kreskas ĉiutage, nun funkcias en luita komforta ĉambro, ĉe la urbocentro, en multetaĝa domo sur la strato 7 de Abril, 176 — 3<sup>o</sup>/34. Tie okazas ĉiun sabate, de la 15a ĝis la 16a, kurso de Esperanto kaj poste kunveno de la estraro. Alia kurso, je la sama horo, funkcias en la malnova sidejo.

Tre valora por la disvastiĝo de Esperanto, ne nur en la ĉefurbo, sed ankaŭ en aliaj lokoj de la ŝtato, estas la ĉiutaga disradiado, pere de la stacio de "Rádio Piratininga", kiu okazas nun de la 8.45a ĝis la 9a. Jam komenciĝis nova kurso, kies libro uzata estas la "Primeiro Manual de Esperanto". Ĉar s-ro Ismael Gomes Braga faris specialan eldonon de tiu ĉi lern-

libreto kaj donacis 2.000 ekzemplerojn al tiu Radisocieto, ĝi estas dissendata senpage al ĉiu ĝin petinta.

**Santos.** — Estas provizore en tiu ĉi urbo nia kara samideano Pastro Agostino Stellacci, kapelano de la itala vaporŝipo "Conte Grande", kiu vizitadis la sidejon de la loka grupo. Subskribitan de li kaj de kelkaj grupanoj ricevis salutan poŝtkarton la prez. de BLE.

**Jundiaí.** — Loĝas nun en tiu ĉi urbo nia kunligano d-ro Frederico de Castro Menezes. Jen lia adreso: Caixa postal 65.

**SANTA CATARINA. Florianópolis.** — Vigla propagando faras s-ro Giovanni P. Faraco, ĉefstatistikisto de la ŝtata Departemento de Statistiko. Li ĵus faris perkorespondadan ekzamenon kaj ricevis la "Ateston pri Lernado" donitan de BLE. "Gazeto" kaj "Dia e Noite" publikigis notojn pri la inaŭguro de kurso de Esperanto sub lia direkto, kiu funkcias merkrede kaj sabate. En sia lasta kunveno la "Junta Executiva Regional de Estatística", kiun li partoprenas, aprobis deziresprimon por granda sukceso de tiu kurso, en kiun enskribiĝis ok statistikistoj, tri policanoj, unu ĵurnalisto kaj du ŝtataj oficistoj. Ni esperas, ke tiu kurso estos la ĝermo de estonta klubo.

**RIO GRANDE DO SUL. Porto Alegre.** — "Jornal Espirita" publikigis ĉiujn rezoluciojn de la Unua Brazila Kongreso de Spiritistaj Ĵurnalistoj, inter kiuj estas tiu, kiu konsilas, ke ĉiuj spiritistaj ĵurnalistoj kaj verkistoj lernu Esperanton, por ke estonte oni havu redaktaron kapablan redakti spiritisman gazeton.

**Dom Pedrito.** — Sur la Monata Bulteno de la Spiritista Centro "João Batista" ni legis, ke s-ro João Severo faris paroladon titolitan "Kial ni devas lerni Esperanton?" Li ankaŭ faris similan paroladon en la najbara urbo Bagé.

**MINAS GERAIS. Belo Horizonte.** — Nia delegito s-ro Wilson Veado, kies entuziasmo por Esperanto estas ĉiam arda, sukcesis havigi en la nova gazeto "Universitário", organo de la penso de l' studentoj el Minas Gerais, esperantistan fakon. Pri ĝi ni detale parolas aliloke. Artikoloj pri Esperanto aperis en la gazeto "Síntese". La ĉefaj havas la jenajn titolojn: "Artefaritaj lingvoj", "Naturaj lingvoj", kaj "La brazilaj spiritistoj kaj Esperanto", ĉiujn verkitajn de Ismael Braga.

Daŭrigas sian kurson ĉe la "Grupo Esperantista Humberto de Campos" s-ro Ing. Aristoteles Juvenal de Faria Alvim.

**Juiz de Fora.** — Fondiĝis "Grupo Esperantista Abel Gomes", kies sidejo estas: Strato Halfield, 811, dua etaĝo. Nenian informon ni ricevis pri ĝia estraro. Ni nur eksciis, ke funkcias kurso direktata de Kapitano Jorge Santana, kiu ankaŭ havas kurson ĉe la "Centro Esperantista de Juiz de Fora".

**Carangola.** — Ni ankoraŭ ne ricevis oficialan informon pri la fondo de "Grupo Esperantista de Carangola", kies unua sek. estas f-ino Cedilha Neto. Ĝia sidejo estas sur Strato Olegario Maciel, 71.

La 21an de Aprilo fondiĝis "Nucleo Esperantista", kies estraro konsistas el la jenaj personoj: Prez. — s-ro Armando Cunha, vicprez. — s-ino Celina Machado, unua sek. — s-ro Josino Gomes, dua sek. — Bras Italo Pagano, kas. — s-ro Manoel Gonçalves Ramos, bibl. — s-ro Manoel Alves da Silva, orat. — s-ro Kruger Matos kaj zorgantino f-ino Rosaura Mateus.

**S. Sebastião do Paraíso.** — Dank'al la vigla propagando farita de s-ro Luiz Anacleto de Sillos, kiu skribis diversajn artikolojn per la kolonoj de la gazeto "O Liberal", kaj de aliaj personoj fondiĝis la 12an de Aŭgusto "Carlo Bourlet Esperanto Grupo", kiu aklamis la jenan estraron: Prez. — Prof. Nestor Lacerda, vicprez. — s-ro Vicente de Paulo Araujo, unua sek. — s-ro Luiz Anacleto de Sillos, dua sek. — prof. Nelson Lacerda, unua kas. — s-ro Walter Braghini, dua kas. — s-ro Alaor Ribeiro, bibl. Prof. Antonio Roque Martins. La kontrola konsilantaro konsistas el la jenaj personoj: s-roj Pindora de Carvalho, Ely de Lins kaj Oswaldo Gaspar. La unua sek. skribis leteron al nia Ligo petantan detalan informon por ĝia aliĝo. Bonan sukceson!

**GOÍAZ. Goiânia.** — Fondiĝis "Grupo Esperantista de Goiânia", kies unua estraro estas: Prez. — d-ro Cristiano Cordeiro, sek. — s-ro João Nicolau kaj kas. — s-ro Silvestre Alves de Castro.

**RIO-DE-JANEIRO.** — S-ro A. Couto Fernandes daŭrigas sian teori-praktikan kurson, kiu funkcias dufojn ĉiusemajne ĉe la sidejo de la Geografia Societo, sub la aŭspicioj de "Brazila Klubo Esperanto".

"Brazila Ligo Esperantista" faris novan eldonon de la flugfolio en portugala lingvo "Kio estas Esperanto?" kaj eldonis en Esperanto la Kajeron kun bildoj kaj vortaretoj uzataj en la publika lernejo Petro II por la instruado de la franca kaj angla lingvoj per la natura metodo. Al ĉiu ligano BLE. sendis ekzempleron de tiu ĉi kajero.

## R e f o r m a d o r

La estraro de BLE aranĝis ĉe la Ekspozicio organizita de "Brazila Filatelio Klubo" standon kun ĉiuj poŝtaĵoj kun teksto en Esperanto eldonitaj dum la lasta jardeko kaj stampoj kun vortoj en tiu ĉi lingvo uzataj de la poŝtagentejoj. Plenumante la peton de la prez. de BLE. d-ro Libero de Miranda, regiona direktoro de la Departamento de Poŝto kaj Telegrafo, farigis specialan stampilon kun vortoj en Esperanto por esti uzata dum la 13a Internacia Specimenfoiro de Rio-de-Janeiro.

La "Librejo de la Brazila Spiritista Federacio" faris novan eldonon de la lernolibro "Primeiro Manual de Esperanto", el kiu s-ro Ismael Braga faris donacon de 2.000 ekzempleroj al la "Rádio Piratininga" kaj 100 al BLE. Li ankaŭ senpage dissendis grandan nombron da ĝi al ĉiuj brazilaj grupoj, al la aŭdantoj de la kurso farata, ĉiuvendrede, pere de la stacio de "Rádio Transmissora" kaj al multaj esperantistoj. Tiu Librejo ankaŭ eldonis 30.000 ekz. de la broŝureto "Kial ni devas lerni Esperanton?", en portugala lingvo, kaj 5.000 ekz. de la broŝureto "La Misio de Esperanto", en la nacia kaj internacia lingvoj.

Aperis la 4a numero de "Anuário Brasileiro de Literatura", eldonita de Fratj Pongetti. Ĝi publikigis artikolon de Cristiano Agarido jese respondantan la demandon: Ĉu ekzistas mediuma literaturo?, la unuan skribaĵon de Zamenhof, en la portugala kaj esperanta lingvo, kaj la Dokumenton de la Ministraro pri Kultoj kaj Edukado en Grekujo, en la portugala kaj greka lingvoj, per kiu oni donis instrukciojn pri la instruado de Esperanto en tiu lando.

Funkcias kurso de Esperanto kun 20 gelnantoj ĉe la sidejo de "Grupo Esperantista Bezerra de Menezes".

Artikoloj kaj notoj pri Esperanto aperis sur la gazetoj "Jornal do Comércio", "Jornal do Brasil", "Diario de Notícias", "Meio Dia", "Reformador", "Revista Terapêutica", "Juventude Unida" kaj aliaj.

La revuo "Reformador", oficiala monata organo de la "Brazila Spiritista Federacio", aperigas en ĉiu numero artikolojn por Esperanto, notojn pri la Esperanto-movado en Brazilo kaj eksterlande kaj reklamojn de libroj en kaj pri Esperanto. Direktas la esperantistan fakon nia sindona samideano s-ro Ismael Gomes Braga, kiu okupas ĉe la Federacio la senpagan oficon de Direktoro de la Propagando de Esperanto.

Ĝia Septembra numero publikigas detalan raporton pri lia agado dum la periodo de Julio 1939a al Junio 1940a. Ni citas la artikolon, kiu parolas pri la "Unua esperantisto en Brazilo", nome s-ro Valdomiro Lorenz, kiu naskiĝinte en Aŭstrujo alvenis al Brazilo en la jaro 1893a. Poligloto, sciencisto kaj poeto li verkis

multajn poeziojn, kiuj aperis en "Brazila Esperantisto", kaj ricevis premion ĉe konkurso de poezio organizita de B.L.E. Li estas nun 67aĝa kaj loĝas en S. Feliciano, Ŝtato Rio Grande do Sul. D-ro Baggi de Araujo estas la unua brazila esperantisto kaj li estas la unua fremdulo, kiu unue faris en Brazilo propagandon de Esperanto.

Alia artikolo parolas pri la "Unua tutamerika gazeto". Jen peco de tiu artikolo: "Tutamerika Numero" signalas la komencon de nova epoko, periodo de pli intensa kunlaborado inter la novmondaj esperantistoj. Certe aliaj asocioj aliĝos al la kvaroj, kiu komence akordiĝis kaj la tutamerik numero ĉiam kreskos. La unua malfacilaĵo jam estas venkita — ĝi estas la komenco de la laboro — ĉio plia bone marŝos."

### GRUPOS ESPERANTISTAS

Durante o corrente ano fundaram-se em nosso país 16 grupos esperantistas nas seguintes localidades: Belo Horizonte, Campos (2), Carangola (2), Caruarú, Goiânia, Juiz de Fora (3), Limoeiro, Natal, Pereiro, Rio-de-Janeiro e S. Sebastião do Paraíso. De todos esses grupos apenas o "Esperanto-Klubo de Alagoinhas" aderiu à "Liga Esperantista Brasileira". Já recebemos promessas de adesão dos grupos fundados em Limoeiro, Natal e S. Sebastião do Paraíso. Esperamos que alguns dos outros grupos que não tenham nascido de "maldaŭra entuziasmo", adiram à nossa Liga nacional, o que tornará, automaticamente, alguns de seus sócios membros da "Internacia Esperanto-Ligo", com sede em Londres.

Para que um grupo esperantista se filie à Liga basta que pague anualmente, no mínimo, a importância de 50\$, correspondente às anuidades de cinco membros simples.

Convem lembrar que em 1938 fun-

daram-se quatro grupos, dos quais apenas o "Esperantista Grupo Ismael Gomes Braga" aderiu à Liga e que todos os grupos fundados em 1939, a saber: "Katolika Esperantistina Klubo" de Fortaleza, Ceará, "Sociedade Esperantista Konkordo", do Rio-de-Janeiro e "Grupo Esperantista de Araguari", de Araguari, Minas Gerais, aderiram à Liga Esperantista, dando assim um belo exemplo de "Samideaneco". Exemplos semelhantes deram todos os grupos fundados nos anos de 1935, 1936 e 1937.

#### GRUPOS EXISTENTES EM 1.º DE JANEIRO DE 1940

Data da fundação	N.º Fil. à BLE	
1906 . . . . .	1	1
1927 . . . . .	1	1
1932 . . . . .	1	1
1935 . . . . .	1	1
1936 . . . . .	1	1
1937 . . . . .	3	3
1938 . . . . .	3	1
1939 . . . . .	3	3
	14	12

#### GRUPOS ESPERANTISTAS FUNDADOS NO BRASIL NOS ANOS DE 1906 A 1939.

ANOS	NÚMERO DE GRUPOS	
	por ano	total
1907 . . . . .	13	13
1906, 1909, 1922 . . . . .	7	21
1908, 1910, 1912 . . . . .	6	18
1911, 1938 . . . . .	4	8
1914, 1921, 1924, 1937, 1939 . . . . .	3	15
1919, 1920, 1923, 1927, 1929, 1930, 1933 . . . . .	2	14
1913, 1915, 1916, 1917, 1918, 1925, 1928, 1931, 1932, 1933, 1935, 1936 . . . . .	1	12
1926, 1934 . . . . .	0	0
Total geral . . . . .	101	101

**Cadernos para o ensino do Esperanto pelo método direto.**

**Preço: 3\$000**

#### ADRESARO

S-RO MANUEL GIL RODRIGUES  
deziras korespondadi kun brazilaj esperantistoj — Adreso: Rua do Mirante 14, Silves, Algarve, Portugal.

**BONVOLU ATENTI:**

El letero ĵus ricevita de S-ro Cecil Goldsmith, ĝenerala sekretario de "Internacia Esperanto-Ligo":

"Tamen, ni ankoraŭ bezonas viglan subtenon. Precipe, mi esperas, ke vi povos kolekti la kotizojn de kelkaj delegitoj kiuj ĝis nun ne pagis. Ni perdis tiom da delegitoj en la invaditaj landoj, ke ni tute ne deziras perdi tiujn en la landoj, kie ni povas ankoraŭ labori".

**ESPERANTISTA GAZETARO**

Ni ricevis dum la dua jarduono nur la jenajn eksterlandajn gazetojn:

"Amerika Esperantisto". — 1410 H. Street, N-W., Washington, D.C. Usono. Jul./Aŭg., Sept. kaj Okt. 1940.

"Arbetar Esperantisten". — Barnhusgatan, 8, Stockholm, Svedujo. Aŭg./Sept. 1940.

"Argentina Esperantisto". — Misiones, 369, Buenos Aires, Argentina. Aŭg./Sept. 1940.

"The British Esperantist". — Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo. Junio/Julio kaj Aŭg. 1940.

"Bulgara Esperantisto". — 50 str. Aabin, Sofio, Bulgarujo. Junio 1940.

"Dansk Esperanto-Blad". — Fredericia-gade 8, Aalborg, Danujo. Aprilo kaj Majo 1940.

"Esperanto-Internacia". — Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo. Julio/Aŭg. 1940.

"Estu preta". — Winchester, Illinois Usono. Oka numero de la dua jaro.

"Flandra Esperantisto". — Magdalenestraat 29, Kortrijk, Belgujo. Aprilo 1940.

"Heroldo de Esperanto". — Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando. 1/Majo 1940.

"Helena Esperantisto". — Odos Rodou 21, Athinai 8, Grekujo. Marto-Aprilo 1940.

"Prateko". — At. Nikolov, Sevljevo, Bulgarujo. Julio 1940.

"Heroldo de Ĉinio". — P.O. Box n. 175, Chungking, Ĉinujo. 1/jul. kaj 16/jul. 1940.

"Informoj". — Postkast 6, Tallinn, Estonujo. Jul./Aŭg. 1940.

"Kanada Bulteno". — G.P.O. Box 272, Toronto, Canada. Aprilo 1940.

"Nia Organo". — K. Gorter, Kalibarcouzuid 33, Cheribon, Nederlando. Jun./jul. 1940.

"Nia Parolilo". — Linnégatan 38, Goteborg, Svedujo. Sept. 1940.

"La Praktiko". — Postkesto 200, Den Haag, Nederlando. Majo 1940.

"La Revuo Orienta". — Hoogo-Motomati, I-13, Tokio, Japanujo. Aŭg./Sept. kaj Okt. 1940.

"Scienca Gazeto". — 1111 Brooke Road, Rockford, Illinois, Usono. Jul./Aŭg. 1940.

"Svenska Esperanto-Tidningen". — Fack 698, Stockholm I, Svedujo. Sept. 1940.

"Voĉo el Oriento". — P.O. Box 78, Chengtu, Szechwan, Province, Ĉinujo. Jun., Jul. kaj Aŭg. 1940.

Ni ankaŭ ricevis la jenajn gazetojn kun Esperanta Fakoj:

"Kárpáti Vasárnap" (Karpata Dimanĉo). Postkesto C. 13, Hungarujo. Jul., Aŭg. kaj Sept. 1940.

"P. T. T.". — Oficiala organo de la Asocio de PTToficistoj. Jugoslavujo. Majo 1940.

**BRAZILA LIGO ESPERANTISTA e Internacia Esperanto-Ligo**

**QUOTA ANUAL**

1941

Categoria	1941	
	sócio isolado	sócio de grupo filiado
AM (membro simples) . . . . .	15\$000	10\$000
MJ (recebe o "Jarlibro") . . . . .	25\$000	20\$000
MA (recebe o "Jarlibro" e a gazeta mensal "Esperanto Internacia") . . . . .	50\$000	45\$000
MS (sócio cooperador. Recebe o "Jarlibro" e a gazeta "Esperanto Internacia") . . . . .	120\$000	115\$000

Todos recebem gratuitamente "O Brasil Esperantista".

Nos lugares em que existe grupo esperantista filiado, a adesão à Liga deve ser feita de preferência por intermédio dele.

Para que um grupo esperantista se filie à Liga, basta que pague a importância correspondente às quotas de cinco sócios de qualquer categoria. Assim um grupo pode ser filiado à Liga pagando, no mínimo, a quota anual de 50\$000.

De acordo com seus Estatutos, todos os sócios do BRAZILA KLUBO "ESPERANTO", são sócios da Liga Esperantista Brasileira e da Internacia Esperanto-Ligo.

Todo sócio MJ, MA ou MS, pode ser delegado da I. E. L. sem acréscimo de pagamento.

**Grupoj Aligintaj al B. L. E.**

BRAZILA KLUBO "ESPERANTO". (1906). Sidejo: Praça da República, 54. Rio-de-Janeiro.

SUDBRAZILA ESPERANTISTIGILO. (1927). Sidejo: Rua dos Andradas, 1431. Porto Alegre. Rio Grande do Sul.

CENTRO ESPERANTISTA DE SANTOS. (1932). Sidejo: Rua Baía, 57. Santos. Est. São Paulo.

GRUPO ESPERANTISTA DE MONTE APRAZIVEL. (1935). Sidejo: Monte Aprazivel. Est. S. Paulo.

ESPERANTA GRUPO DE BAÍA. (1936). Sidejo: Rua Bangala, 18. Salvador. Baía.

S. PAŬLO ESPERANTA KLUBO. (1937). Sidejo: Rua 7 de Abril, 176, 3.º — sala 34. São Paulo.

PERNAMBUKA ESPERANTO-ASOCIO. (1937). Sidejo: Rua do Príncipe, 398. Recife. Pernambuco.

ESPERANTO - KLUBO DE SANTO AMARO. (1937). Sidejo: Av. Viana Bandeira, 14. Santo Amaro, Baía.

GRUPO ESPERANTISTA "ISMAEL GOMES BRAGA". (1938). Sidejo: Praça D. Moura, 334. Garanhuns, Pernambuco.

SOCIETO ESPERANTISTA "KONKORDO" (1939). Sidejo: Praça 11 de Junho, 49. Rio-de-Janeiro.

GRUPO ESPERANTISTA DE ARAGUARÍ. (1939). Adreso: Caixa postal 73. Araguari. Minas Gerais.

KATOLIKA ESPERANTISTINA KLUBO. (1939). Sidejo: Rua Benfica, 2457. Fortaleza. Ceará.

ESPERANTO-KLUBO DE ALAGOINHAS. (1940). Sidejo: Rua 24 de Outubro, 12. Alagoinhas. Baía.

**UNIVERSITÁRIO**

Meritas specialan rimarkon de nia bulteno la apero, en Belo Horizonte, de "Universitário", organo de la penso de l' studentoj el Ŝtato Minas Gerais, ĉar ĝi malfermis interesan fakon por la propagando de Esperanto, sub la direkto de unu el siaj sekretarioj — s-ro Wilson Veado, fervora esperantisto kaj delegito en Belo Horizonte de la Internacia Esperanto-Ligo kaj Brazila Ligo Esperantista.

Al s-roj Luiz Gonzaga e Oliveira, Odair de Oliveira kaj Paulo Gomes, direktoroj de tiu tre simpatia gazeto, al kiu ni deziras longan kaj fruktodanan vivon, ni sendas varman dankon kaj al nia kunligano Wilson Veado, koran gratulon pro lia venko, kiu certe multe kontribuos por la disvastigo de Esperanto en Minas Gerais.

Jen estas la nomoj de ĝiaj ĉefaj subfakoj: "Esperanto en Brazilo kaj en Eksterlando, Esperanto en Hollywood, Radio kaj Esperanto, La Brazila Literatura tradukita Esperanten, k. e.